



共同
語

Mikrofone

8-a jaro • Aprilo-Junio, 2010



CRI

中国国际广播电台世界语部
Esperanto-redakcio de ĈRI

N.30



Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuaĵoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuaĵoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!

ENHAVO

3 Ĉinio tutforte okazigas Ŝanhajan Mondan Ekspozicion sukcesa, brila kaj neforgesebla

8 Okazis granda tertremo en Yushu de Qinghai-provinco

10 Intervjuo
Renato Corsetti: UEA devas profunde ŝanĝi sian rolon


12 Cititaj Leteroj

14 Tra la Mondo

15 Mikronovelo
Am-iluzio

Ŝanhaja Monda Ekspozicio okazos dum la periodo de la 1-a de majo ĝis la 31-a de oktobro. Por ke la publiko per la gepatraj lingvoj vivece kaj detale konu informojn pri la ĉeftemo, pavilonoj kaj aktivadoj de Ŝanhaja Monda Ekspozicio, kaj signifon de la priurba ĉeftemo al la homara vivo, Ĉina Radio Internacia, per sendrata kaj reta disaŭdigo ekde la 20-a de februaro ĝis la 1-a de aŭgusto, serie elsendos tutmondan scian konkurson titolitan "Renkontiĝo en Ŝanhaja Monda Ekspozicio" kaj bonvenigas vian partoprenon.

Ĉinio tutforte okazigas Ŝanhajan Mondan Ekspozicion sukcesa, brila kaj neforgesebla



Vespere de la 30-a de aprilo en la kultura centro de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, 2010, okazis inaŭgura ceremonio de la ekspozicio, kaj ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao proklamis la ekspozicion malfermita. Tio markis, ke la ekspozicio, por kiu Ĉinio faris 8-jaran preparon, komencis akcepti gastojn el diversaj lokoj de la mondo.

En la inaŭguro, ĉina vicĉefministro kaj direktoro de Organiza Komitato de Ŝanhaja Monda Ekspozicio Wang Qishan faris parolon por danki la aktivan partoprenon de 246 landoj kaj internaciaj organizoj, entreprenoj ĉinaj kaj eksterlandaj. Li esprimis, ke la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, unuafoje prenante urbon kiel ĉeftemon, estas platformo de mondaj popolanoj por fari kreadon, kunlaboron kaj interflun. La

ekspozicio malfermos la pordon de la estontecaj urboj, gvidos novan vivmanieron, akcelos harmonion de homaro, urboj kaj naturo, antaŭenpuŝos konstruadon de urboj pacaj, civilizaciaj kaj feliĉaj kaj akcelos ampleksan disvolviĝon de homaro.

Prezidanto de Buroo de Internacia Ekspozicio Jean-Pierre Lafon esprimis en sia salutparolo, ke Monda Ekspozicio respondis al la bezono de epoka disvolviĝo, dialogo kaj interfluo kaj reciproka konkurado. Li esprimis, ke ĉi-foja ekspozicio akcelos altiĝon de homara konscio por konstrui pli longedaŭran, pli justan, pli sekuran kaj pli harmonian urbon.

Tuj post kiam Hu Jintao proklamis la Ekspozicion malfermita, artistoj kaj trupoj el diversaj lokoj de

la mondo faris belegan prezentadon. Altteknologiaj rimedoj anticipe sentigis al homoj ĉarmon de la ekspozicio. Post la prezentado sur la du bordoj de la rivero Huangpu aperis la spektaklo de fajraĵoj kaj ŝprucfontoj.

La Ŝanhaja Monda Ekspozicio havas la ĉeftemon: “Pli Bela Urbo, Pli Bela Vivo.” Diversaj landoj kaj internaciaj organizoj plene montros kaj pridiskutos sur scenejo de la ekspozicio la urban rolon akceli la homaran evoluon.

Vespere de la sama tago, en Ŝanhaja Internaca Konferenca Centro, prezidanto Hu Jintao kaj lia edzino Liu Yongqing okazigis bonvenigan bankedon por honoraj gastoj ĉeestontaj al la inaŭguro de la Ekspozicio. Antaŭtagmeze de la 29-a de aprilo., prezidanto Hu Jintao



vizitis la Ekspozicion.

Post inaŭguro prezidento Hu Jintao vizitis iujn pavilonojn de la Ekspozicio. Li emfazis, ke oni faru la Ekspozicion sukcesa, brila kaj neforgesebla.

La 1-an de majo, okazis ceremonio de la malfermo de ĉina Ŝanhaja Monda Ekspozicio, 2010. La ekspozicio oficiale komencis akcepti vizitantojn en- kaj eksterlandajn. Vizitante la Ekspozicion ĉinaj kaj fremdlandaj turistoj spertos brilan kulturon de la homaro kaj plej progresintajn teknikojn kaj konceptojn.

En la ceremonio, Vicente Loscertales, ĝenerala sekretario de Buroo de Internacia Ekspozicio, unue esprimis dankon al Ĉinio, al ĉiuj eksponantoj, laborantoj kaj volontuloj. Vicente Loscertales esperis, ke en la estontaj 6 monatoj, la internacia socio kunlaboros sincere, kune sin dediĉos por prezento de brila grandioza ekspozicio kaj faros pacan diskuton kaj konstruivan interkonsiliĝon pri estonta urba disvolvo. Li diris: "Ŝanhaja Monda Ekspozicio estas grandioza evento montranta la progreson kaj atingon de la homaro, ĝi stimulos nunajn homojn kaj posteulojn senĉese strebi kaj praktiki la idealon pri 'Pli Bela Urbo, Pli Bela Vivo'. Monda ekspozicio estas ankaŭ motoro por ekspozicia organizanta urbo kaj ĝiaj urbanoj, kaj ekspoziciaj ĉeestantoj. Mi firme konvinkiĝas, ke Ŝanhaja Monda

Ekspozicio estos plej sukcesa, brila kaj neforgesebla, kaj ĉiuj vizitantoj povas posedi belan memoron pri ĝi."

Poste, Jia Qinglin, prezidento de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, donis salutmesaĝon, kaj bonvenigis al ĉiuj gastoj kune atesti gloron de ĉina Ŝanhaja Monda Ekspozicio, 2010. Li diris: "Nun, ni gaje amasiĝas en la ekspozicia zono, kune aprecas pavilonojn kreivajn kaj apartajn, spertas abundajn scienc-teknikajn fruktojn, partoprenas en diversaj forumoj kun saĝeco kaj ĝuas brilajn artajn aktivadojn. Ni certe povos senti sukceson en paco kaj harmonio kaj brilecon en kreivaj aktivadoj, certe ne forgesos la ekspozicion en ĝojo. Ĉio komenciĝis de Monda Ekspozicio kaj ĉio amasiĝis en ekspozicia zono. Ni kune atestu gloron de la zono."

Por bonvenigi ĉinajn kaj fremdlandajn turistojn, organizanto de la ekspozicio faris sufiĉan preparon. En la lasta tagdeko de aprilo, ili faris 6 provfunkciojn kaj ĉiufanke ekzamenis instalaĵojn, sekurigan kontrolon kaj servadon. Estro de volontula grupo de la zono sinjoro Xia Kejia sciigis al raportisto, ke laŭ reala funkcia stato, ili ĉiam reguligos nombron de volontuloj, samtempe fortigos trejnon por liveri pli fakan kaj bonkvalitan servadon al gastoj.

La Internacia socio pozitive taksis Ŝanhajan Mondan Ekspozicion:

Ĝenerala direktoro de Internacia Organizo de Migrado William Lacy Swing laŭdas la ĉeftemon de ĉifoja monda ekspozicio. Li diris: "Ni fieras por Ĉinio kaj Ŝanhajo pro okazigo de la Monda Ekspozicio. La ĉeftemo de la ekspozicio profunde impresis min. La Internacia Organizo de Migrado respondecas pri tutmonda migrado. Nun frekvenca fluas loĝantoj sur la terglobo, kaj diversaj landoj havas 21,4 milionojn da migrintoj ĉiujare kaj plejparto de ili serĉas laboron en urboj. Do 'Pli Bela Urbo, Pli Bela Vivo' estas tre bona temo. Nia organizo kaj mi mem atendas la Ŝanhajan Mondan Ekspozicion."

En malferma tago de usona pavilono, usona ŝtata sekretario Hillary Clinton esprimis esperon, ke printempvento de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio akcelos disvolviĝon de la rilatoj inter Usono kaj Ĉinio: "Mi vizitos la Ŝanhajan Mondan Ekspozicion, kiam mi ĉeestos al la 2-a Ĉina-Usona Strategia kaj Ekonomia Dialogo okazonta en Ĉinio. Mi profunde kredas, ke ni nin dediĉas al antaŭenpuŝo de popolana interfluo kaj tio estas bazo de konstantaj rilatoj inter la du landoj."

Antaŭtagmeze de la 1-a de majo en la zono de Ŝanhaja Monda ekspozicio okazis inaŭguro de la Belga-Eŭrop-Unia Pavilono. Jose Manuel Durao Barroso, prezidento de





Komisiono de Eŭropa Unio, ĉeestis al la inaŭguro kaj faris parolon. Li esprimis, ke EU ĉiam atentis la rilatojn kun Ĉinio kaj esperas plue akceli reciprokajn komprenon kaj konfidon kun Ĉinio pere de la vizito al Ŝanhajo. Li diris: "Estas la unua fojo, ke Eŭropa Unio partoprenas en Monda Ekspozicio ekster la Unio, ĉar ni alte atentis la strategian kunlaboran partnerecon inter Eŭropa Unio kaj Ĉinio."

Kanada ĉefministro Stephen Harper publikigis deklaron en malferma tago de kanada pavilono, esprimante, ke la Ŝanhaja Monda Ekspozicio de 2010 liveras ŝancon al Kanado kaj Ĉinio por evoluigi pli fortajn ekonomiajn, diplomaciajn kaj kulturajn rilatojn.

En la lastaj tagoj, eksterlandaj amaskomunikiloj multe raportis solenon de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio. Danlando, Ĉeĥio, Rumanio, Alĝerio, Francio, Singapuro kaj Kamboĝo akurate raportis pri la solena inaŭguro. Ili opinias, ke la grandioza ceremonio estas plena de novaĵoj kaj la ekspozicio estas atendinda.

La ŝtata televidstacio de Rumanio rekte brodkastis la inaŭguran ceremonion, kaj la ŝtata novaĵ-agentejo faris sinsekvajn raportojn, dirante, ke Ŝanhaja Monda Ekspozicio estas rekorda laŭ la investo, areo de la ekspozicia zono kaj la nombro de partoprenantoj.

La dua ŝtata televidstacio de

Danlando raportis, ke Ŝanhaja Monda Ekspozicio en plej granda skalo kaj kun plej granda kosto estas bona ŝanco, pri kiu diversaj landoj delonge soifas por sin montri al Ĉinio. Multaj landoj kaj regionoj kolektiĝis en Ŝanhajo por montri la altirforton al la rapide disvolviĝanta Ĉinio.

La Monda Ekspozicio unuafoje okazas en evoluanta lando en la historio de la pasintaj 159 jaroj. Ĉinio plenforte okazigas la Ekspozicion brila kaj neforgesebla. En ĝi partoprenas 246 landoj kaj internaciaj organizoj. Oni prognozis, ke dum ses monatoj de la 1-a de majo ĝis la 31-a de oktobro, la Ekspozicio tiros al si 70 milionojn da vizitantoj el la tuta mondo.

La 4-an de majo, la Ekspozicio eniris en la periodon de ordinaraĵo kaj turistoj povas rekte aĉeti biletojn ĉe pordo de la ekspozicia zono. Ĝis la 14-a horo, 130 mil turistoj eniris en la zonon tiutage, la nombro proksimiĝis al tiu hieraŭ.

Por pli bone servi al fremdlandaj turistoj, la organizanto liveras varman telefonlinion en 12 lingvoj, turistoj fremdlandaj povas konsulti aferojn pri vizito.

Ĝis la 4-a de majo, entute 33,11 milionoj da biletoj de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio estis vendataj. Lokaj familioj de Ŝanhajo baldaŭ akiros donacajn biletojn de la Ekspozicio. Nuntempe, vizitantoj de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio jam superis 20 milionojn da homfojoj.

La Ekspozicio estas grava okazaĵo ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la tuta mondo. Ĝi kompreneble vekis altan atenton ne nur de la tuta mondo, sed ankaŭ de niaj diverslandaj aŭskultantoj.

Frue antaŭ la inaŭguro, multaj jam esprimis komentojn: Vicprezidanto de Nepala Esperanto-Asocio Narendra Raj Bhattara skribis:

"La Ŝanhaja Monda Ekspozicio estas grava evento ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la tuta mondo. Ĝi montros al la mondo ĉinajn potencojn rilate al ekonomio, tekniko, industrio kaj kulturo kaj reflektos ekzemplajn atingojn de novprosperantaj landoj. Certe, ĝi estas subjekto de granda intereso por najbara lando kiel Nepalo. Espereble, moderna evoluo ĉina helpas al progresado de disvolviĝantaj landoj.

"La ekspozicio prezentos Ĉinion kiel pacan kaj potencon rilate al politiko kaj ekonomio dum la 21-a jarcento.

"Daŭra kaj stabila multflanka progreso de Ĉinio havas specialan gravecon al suda Azio. Ni devas rigardi ĝin kiel okazon por celebri."

Ĉeĥa amiko Jiri Patera skribis en sia letero:

"En la monda ekonomia krizo oni ofte citas Ĉinion, kiel landon, kiu ne nur sukcese solvas la ekonomiajn problemojn, sed fakte helpas superi



la krizon ankaŭ al aliaj landoj, precipe al Usono. En la ĉefaj ĵurnaloj troviĝas preskaŭ ĉiutage informoj pri Ĉinio, ekzemple pri la kresko de vendoj de aŭtomobiloj de marko Skoda, aŭ pri tio, ke el Ĉinio oni jam komencis liveri la eksponaĵojn por la Monda Ekspozicio en Ŝanhajo. Niaj politikaj kaj ekonomiaj altranguloj en la Ekspozicio en Ŝanhajo vidas gravan medion por disvastigi la eksterlandan komercon de nia lando en la estonteco.”

Tuj post la inaŭguro, Jawaïd Eahsan el Pakistano, Petro Zilvar, nome de la Interkultura Centro Herzberg, Germanio, kaj multaj aliaj sendis gratulon al Ĉinio pro sukcesa inaŭguro de la Ekspozicio. Ili esperas, ke ni multe informos pri la Ekspozicio.

Japana amiko Yoshihiro Takahashi letere deziras sukceson de la Ŝanhaja Monda Ekspozicio. Leopold Patek el Aŭstrio laŭdis interesan raportadon pri la Ekspozicio. Hazafi Zoltan el Hungario sendis grupon da fotoj de diverslandaj pavilonoj.

Ni esperas, ke vi aktive partoprenos en la tutmonda scia konkurso titolita "Renkontiĝo en




Ŝanhaja Monda Ekspozicio". Ni kredas, ke vi ĉiuj sendube metas grandan atenton al ĝi, kiel al Pekinaj Olimpikoj en 2008. Viaj impresoj kaj komentoj estas bonvenaj.

Koran dankon al s-roj Narendra Raj Bhattara, ĉeĥa amiko Jiri Patera kaj aliaj, kiuj aktive skribis komentojn pri la grava okazantaĵo kaj koran dankon al s-roj Jawaïd Eahsan,

Petro Zilvar kaj aliaj, kiuj sendis al ni varman gratulon. Anticipan dankon al ĉiuj, kiuj daŭre sendos impresojn kaj opiniojn pri la Ekspozicio!

Same kiel Andrew Will, ĉiuj ĝuas sian propran ĝojon en la Ekspozicia Zono.



En la 29-a de majo, la nombro de vizitantoj al Ŝanhaja Monda Ekspozicio superis 500 milojn. Tio kreis novan rekordon post malfermo de la ekspozicia zono.

En la Ŝanhaja Monda Ekspozicio, gustumi tipajn diverslandajn manĝaĵojn estas granda plezuro de vojaĝantoj al la ekspozicio. Usonano Andrew Will estas direktoro de iu japana restoracio en la Ekspozicia Zono. Post inaŭguro de la ekspozicio, lia restoracio akceptas multajn vojaĝantojn ĉiutage. Krom la varma entreprenado de la restoracio, Andrew Will, kiu vendas japanan manĝaĵon en Ĉinio, trovis alian ĝojon en la ekspozicio.

Li diris: "Mi jam vizitis multajn ŝtatajn pavilonojn, kiaj la usona, brita, germana, meksikia kaj ĉilia. Mi aparte rekomendas la Germanan Pavilonon. Ĉar ĝia dezajno estas ege mirinda, ili montras la koncepton pri urbo per interesa interaga maniero kaj samtempe prezentas sian landon. Estas inde viziti. Krome, la Kanada Pavilono estas vizitinda. Mi tre ŝatas efikon en ĝia interno. Ankaŭ la Ĉilia Pavilono estas tre interesa. "


Parolante pri lia plano en la Monda Ekspozicio, Will senhezite diris: "Mi certe vizitos plu aliajn pavilonojn."



Ŝanhaja Monda Ekspozicio bonvenigas vin! Sanhaja Monda Ekspozicio bonvenigas vin!



OKAZIS GRANDA TERTREMO EN YUSHU DE QINGHAI-PROVINCO



La 14-an de aprilo, okazis granda tertremo de 7,1 gradoj en Yushu de Qinghai-provinco. Laŭ statistiko, la tertremo fine kaŭzis morton de 2 698 homoj kaj vundiĝon de pli ol 12 000 personoj. Informiĝinte pri la tertremo, ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao, kiu tiam vizitis eksterlande, tuj faris gravan instrukcion postulante, ke diversaj departementoj plenforte bone faru kontraŭkatastrofan kaj vivsavan laborojn. Li frue finis antaŭplanitan viziton kaj forflugis de Brazilo al Ĉinio. Frumatene de la 18-a de aprilo, li veturis al la plagita regiono por

saluti lokajn oficistojn kaj popolanojn kaj gvidi la batalon kontraŭ la katastrofo.

En la 15-a de aprilo ĉina ĉefministro Wen Jiabao, prokrastante sian eksterlandan viziton, atingis la urbeton Yushu kaj komencis inspekti la staton de la katastrofo, konsoli plagitajn popolanojn kaj gvidi laboron kontraŭ la katastrofo.

Post la tertremo Ĉinio nun faras la grandskalan vivsavadon kaj diversaj lokoj akurate etendis helpan manon al Yushu por batali kontraŭ la katastrofo.

Post okazo de la tertremo, la centraj entreprenoj tuj starigis unuanivelan urĝan reagon, koncernaj departementoj de Ĉinio urĝe ekfunkciigis la 4-nivelan savan reagon kontraŭ la katastrofo kaj ekspedis laborgrupojn kun diversaj bezonataj materialoj al lokoj plagitaj. La trupoj de la armita polico plej frue iris al katastrofejo por fari kontraŭtertremajn laborojn, 110 membroj de ĉina internacia tertrema savada trupo rapide eniris en Yushu kaj komencis tutnoktan savadon kaj pluraj savadaj trupoj sinsekve atingis kaj rapide komencis savadon. Ĝis la 17-a de aprilo, la nombro de savantoj en Yushu venintaj el diversaj landpartoj superis dek mil homojn, ili jam elsavis pli ol mil homojn. La Ministerio pri Civilaj Aferoj urĝe asignis el centraj rezervejoj de kontraŭkatastrofaj materialoj de 7 urboj 20 000 tendojn, 50 000 vatitajn surtutojn kaj 50 000 vatitajn litkovrilojn al la tertreme trafita loko. Post kiam okazis la tertremo en Yushu, la Ministerio



pri Sano rapide fondis la imunigan grupon konsistantan el 308 lokaj kaj alilokaj profesiaj laborantoj kaj fakuloj. Nun en la tertreme plagitaj lokoj, la imuniga laboro ĉiufanke disvolviĝas. Fremdlandaj amaskomunikiloj pozitive taksis la kontraŭterreman laboron de la ĉina registaro.

En la 21-a de aprilo, laŭ la decido de la ĉina Ŝtata Konsilantaro okazis sur Tian'anmen Placo en Pekino, tutlanda funebro al la viktimoj en la tertremo de Yushu de la Qinghai-provinco. Je la 10-a horo, Hu Jintao, Jiang Zemin, Wu Bangguo, Wen Jiabao, Jia Qinglin kaj aliaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj kune kun tutlandaj diversnaciecaj popolanoj silente funebriis je 3 minutoj por viktimoj en la tertremo de Yushu de Qinghai-provinco. Tio estas alia tago de tutlanda funebro al viktimoj el ordinaraj civitanoj en natura katastrofo, post la tutlanda funebro al la viktimoj en la fortega tertremo de Wenchuan en la jaro 2008. Tiutage duonhisiĝis la nacia flago en la tuta lando kaj ĉinaj ambasadorejoj en la mondo kaj tuttage haltis publikaj amuzaj aktivadoj.

Multaj landoj kaj internaciaj organizoj alte taksis kontraŭterreman savadon kaj liveris monhelpon al la katastrofejo. Ili opinias, ke la ĉina registaro faris grandegan klopodon por savado el tertremo en Yushu. John Holmes, vic-ĝeneral-sekretario de UN pri humanismaj aferoj, diris, ke li profunde kondolencas Ĉinion pro la granda nombro de mortintoj kaj vundiĝintoj en la tertremo en Qinghai kaj admiras la ĉinan registaron pro ĝia altefika savado. Ĝis la 21-a de aprilo, entute 148 landoj kaj 34

internaciaj kaj regionaj organizoj diversmaniere esprimis kondolencon al la ĉina registaro kaj la ĉina popolo pro la tertremo.

Altajn atenton kaj zorgon metas ankaŭ multaj niaj aŭskkulltanoj:

S-ro Leopold Patek el Aŭstrio esprimis en sia mesaĝo: "Ĉi-jare en la paska tempo estas ankaŭ bona novaĵo, nome pri la savado de la ĉinaj ministoj el ĉina minejo. La radioredaktoro eĉ diris, ke tio estas paska miraklo." Ankaŭ germana amiko Anton Kronshage esprimis gratulon kaj laŭdon al la ĉinaj savtaĉmentoj, kiuj savis 115 ministojn. Koran dankon al ĉiuj, kiuj zorgas pri la evento en Ĉinio.

Ĝis la 23-a de aprilo, la Ĉina Filantropia Federacio ricevis de sociaj rondoj sume 566 milionojn da juanoj, kiujn oni jam transdonis perbanke al la savado en la tertrema katastrofo de Yushu.

Vespere de la 20-a de aprilo en Pekino, okazis la grandioza benefico por monkontribuo al Yushu plagita de la tertremo, kaj la ĉina Centra Televidstacio faris la lokalan rektan dissendon. La benefico daŭris 3 horojn kaj kolektis 2,175 miliardojn da juanoj.

La 19-an de aprilo la registaro de Hongkong asignis 4,5 milionojn da hongkongaj dolaroj por helpi la savadon en Yushu, kaj la 20-an de sama monato, aliajn 130 milionojn da hongkongaj dolaroj por helpi la suferantojn de la tertremo. La registaro de Aomen decidis asigni 100 milionojn

da juanoj por helpi la regionon trafitan de la tertremo. La taiwan-a Ruĝa Kruco sendis kuractaĉmenton konsistantan el 20 membroj al Qinghai por helpi suferintojn.



Ĝis la fino de aprilo, la tertreme plagita regiono Yushu ricevis kontribuitan monon je 4 miliardoj da juanoj de renminbi, inkluzive de la 500 milionoj asignitaj de la centra financo, kaj kontraŭkatastrofajn materialojn valorajn je preskaŭ 4 miliardoj da juanoj.

La 20-an de aprilo, startis la rekonstrua laboro de Yushu.

La 31-an de majo retejo de la ĉina registaro publikigis la dokumenton "Opinioj de la Ŝtata Konsilantaro pri Politiko kaj Rimedoj Subtenantaj la Rekonstruadon de Yushu post la Tertremo". Laŭ la opinioj la ĉina registaro fundamente finplenumos la ĉefan taskon de la rekonstruado de Yushu en tri jaroj por ke evoluo de la loka ekonomio kaj socio komplete rekomenciĝu kaj superu la antaŭan nivelon. Ni kredas, ke Qinghai certe faros Yushu pli bela ol antaŭe.





Renato Corsetti: UEA devas profunde ŝanĝi sian rolon

S-ro Renato Corsetti naskiĝis la 29-an de marto, 1941, en Romo. Li estas itala esperantisto kaj lingvisto, eksa prezidanto de UEA ĝis la jaro 2007. Akceptante intervjuon de "Mikrofone", kuriero de Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia, li resumis siajn atingojn kaj malatingojn dum la prezidanteco kaj elmetis opinion, ke UEA devas profunde ŝanĝi sian rolon por plibone servi al la nuntempa Esperanto-movado.



Mikrofone: Dum via prezidanteco, kion vi plenforte provis fari? Kaj ĉu vi sukcesis?

Renato Corsetti: Kiam mi estis prezidanto de UEA, mi provis fari multajn aferojn. Pri malmultaj mi sukcesis, sed pri la ĉefa afero, kiun mi intencis fari, mi malsukcesis. Kiu estis tiu ĉefa afero? Simple ĝi estis tio, ke UEA kaj ĝenerale la

movado okupiĝu pri la progreso de Esperanto kaj ne pri la servoj al la parolantoj de Esperanto. Mi havis la impreson, ke niaj plej bonaj pensantoj ĉefe okupiĝas pri verkado de romanoj, tradukado de poemoj, eldonado kaj disvendado de libroj, aranĝado de kongresoj por Esperanto-parolantoj, ktp. Tamen, neniu volas transpreni la malfacilan laboron: informi pri Esperanto kaj varbi novajn parolantojn, paroli pri Esperanto al la mondo, kiu ne volas aŭskulti.

Mikrofone: Kiel vi opinias pri viaj atingoj kaj malatingoj dum la prezidanteco?

Renato Corsetti: Nu, estas ĉiam malfacile mem juĝi objektivite pri atingoj kaj malatingoj. Mi kredas, ke la ĉefa atingo estas, ke mi komprenigis al la homoj, ke la vortoj informado kaj instruado estas esencaj por tiuj, kiuj volas nomi sin esperantistoj, aktivaj esperantistoj. Dua atingo estas la enirigo de UEA en la retan mondon. Vi eble ne memoras tion, kio estis UEA ĉi-rilate antaŭ dek jaroj. Mi volas doni al vi anekdoton por klarigi la situacion: la unuaj retaj paĝoj de UEA estis faritaj sekrete kunlabore inter mia tiam 14-jara filo kaj Kalle Kniviila. Tria atingo estas la remalfermo de dialogo inter UEA kaj la esperantistoj ĉie en la mondo, sendepende de tio, ĉu ili pagis kotizon aŭ ne. Ĉefa malatingo estas, laŭ mia opinio,

ke mi ne sukcesis ŝanĝi la situacion de la movado. Ni estis malmultaj kaj ni restas malmultaj. Mi ne sukcesis ŝanĝi movadon kaj fari el ĝi maŝinon por produkti novajn esperantistojn. Tro multaj, vere tro multaj, ĉefe en Eŭropo, sed vere en la tuta ekonomie forta mondo, preferas stultumi inter esperantistoj kaj debati pri ĉio debatebla kaj la plej kreemaj emas produkti servojn por esperantistoj, sed ne fari ion por disvastigi Esperanton. Tion mi ne sukcesis ŝanĝi.

Mikrofone: Ĵus vi menciis, ke vi ne sukcesis ŝanĝi la movadon dum via prezidanteco kaj fari el ĝi maŝinon por produkti novajn esperantistojn. Ĉu la situacio restas ankoraŭ tia?

Renato Corsetti: La situacio restas pli malpli tia. Kiel mi diris pli supre "neniu volas transpreni la malfacilan laboron: informi pri Esperanto kaj varbi novajn parolantojn, paroli pri Esperanto al la mondo, kiu ne volas aŭskulti".

La sola granda klopodo paroli al la neesperantistoj en la lasta jardeko estis la retaj kursoj, per kiuj homoj el plej diversaj landoj, ofte izolitaj en Sauda Arabujo aŭ en Nepalo, lernis Esperanton kaj ankoraŭ plulernas. Se la movado komprenus tion. Se la ĉefaj laŭdoj kaj premioj irus al tiu esperantisto en Burundo, kiu biciklas 20 kilometrojn por instrui Esperanton kaj ne al verkinto de sukcesaj romanoj, tiam la movado ankaŭ postulus alian UEA-n, alian mondan organizaĵon de esperantistoj.

Ni diru la nudan veron: en ĉi tiu momento UEA ĉefe okupiĝas pri servoj al la homoj, kiuj jam parolas Esperanton. Por ili oni organizas kongresojn, por ili oni eldonas la revuon kaj multajn librojn, ktp.

La tasko prezenti al la mondo Esperanton estas lasata al la landaj asocioj. "Ja nur landaj asocioj – oni argumentas – kapablas informi en naciaj lingvoj". Je la nivelo de la landaj asocioj la tasko estas lasata al la lokaj grupoj, kompreneble. Pensu, se vi volas ekzemplojn, pri kiom da kampanjoj en la ĉina por varbi ĉinojn lerni Esperanton estis gviditaj de Ĉina Esperanto-Ligo en la lasta jardeko. Ankaŭ en Ĉinujo la varbado estas io, kion oni volonte lasas al la lokaj asocioj.

Mikrofone: Pri la situacio, ĉu vi havas rilatajn proponojn antaŭenigi la movadon?

Renato Corsetti: Mi revis kaj plurevas pri io alia. Mi revis pri tio, ke la movado komprenos, ke ĝi devas

moviĝi, por prezenti al la mondo la vere solan ideon, kiun ni produktis dum jarcento. Tiun ideon, cetere, ne produktis ni mem, sed ni transprenis ĝin de Zamenhof: "Per komuna neŭtrala lingvo popoloj devas interkompreniĝi kaj progresi sur la vojo de paco kaj interhoma kunlaboro!". Do, Esperanto ne estas ilo por io ajn, ĝi ĉefe estas ilo por alveni al situacio de justaj internaciaj rilatoj, kio estas antaŭkondiĉo por paco.

Tio estas nia historia tasko. Ĉio cetera estas aldonajoj. Kaj nur ni mem, la esperantistoj, estas la portantoj de tiu ideo, neniu alia.

Neniu alia povas helpi por la alveno al situacio de justeco kaj paco almenaŭ en la lingvo-kultura kampo, ĉar tio estas tasko nur de ni, la esperantistoj. Ne povas helpi la Centra Oficejo, kiu ja povas alvenigi la revuon ĝustatempe, nek la Eŭropa Komisiono, nek UN aŭ Unesko, nek io alia. Tiuj aliaj instancoj ne celas niajn celojn. Ili ne volas produkti mondon justan kaj pacan. Ili nur celas firmigi sian povon, se necese per maljusto kaj malpaco.

La sorto de Esperanto estas nur en niaj manoj, de la aktivuloj de la Esperanto-movado.

Mikrofone: Vi substrekis, ke la sorto de Esperanto estas nur en niaj manoj. Do, laŭ via opinio, kion UEA, la plej supera instanco de Esperanto-movado, ĉi-rilate devas fari?

Renato Corsetti: Se tiel estas, UEA devus profunde ŝanĝi sian rolon. Ĝi devus esti la gvidanto de la batalantaj esperantistoj en la mondo. Ĝi devus lanĉi grandajn kampanjojn por disvastigi Esperanton tra Azio, Suda Ameriko aŭ en la internacia aviadila trafiko. Ĝi devus ŝanĝi sian bildon al tiu de asocio batalanta por la protekto de ĉies lingvaj homaj rajtoj en la mondo.

Certe mi ne postulas, ke tio okazu abrupte sed almenaŭ laŭgrade, kaj ni komencu nun, ĉar eble ni pasigis tro da tempo kaj nun estas la lasta momento.

UEA devus laŭgrade iĝi asocio okupiĝanta pri celoj en la kadro de la larĝa celo: justa komunikado per neŭtrala internacia planlingvo.

En tiu funkcio, ĝi devus gvidi esperantistojn partopreni kampanjojn kaj finance subteni kampanjojn. Nun ni estas en la inversa situacio, en kiu UEA serĉas membrojn, kiuj bonvolu pagi por ĝui la servojn de UEA. Ne tute forlasante la servan sektoron, mi tamen diras, ke ĝi devas repreni la moralan gvidon de la movado pri la ĉefa tasko de la movado mem: disvastigi Esperanton por justeco kaj paco.

Ni pluserĉu membrojn kaj pluservu la membrojn, sed ni, UEA, reprenu nian moralan gvidon de la movado per

grandaj kampanjoj por Esperanto en monda skalo.

Tio, interalie, donus al la landaj asocioj la ideon, ke ankaŭ ili devas fari la samon enlande. Tiel la nuna piramido, kiu vidas la batalantojn en la bazo kaj la ĝuantojn en la pinto renversiĝus.

Cetere, tio estus ankaŭ maniero por altigi la prestiĝon de Esperanto ĉe la neesperantistoj, kiuj estas rigardataj kiel sendanĝeraj hobiuloj. Ni devas esti rigardataj kiel danĝeraj portantoj de nova kaj revolucia ideo, kiu celas plibonigi la mondon. Nur tiel ankaŭ UN kaj Unesko finfine povos doni pli da atento al ni.

Mikrofone: Laŭ via longtempa sperto, ĉu ekzistas iuj ne tiel taŭgaj opinioj pri Esperanto kaj la Esperanto-movado?

Renato Corsetti: Ekzemple, estas eraro kredi, ke la Centra Oficejo estas ĉio, kaj ke ĉio dependas de ĝi. La esencaj aferoj de Esperanto, la proponado de ĝi al la homoj kaj la instruado de ĝi dependas de la estraro, de la komitato kaj de la aktivuloj tra la landoj. La Centra Oficejo havas nur rolon subtenan pri tio, sed la ĉefa respondeco estas ĉe la estraro kaj ĉe la aktivuloj. Se Esperanto ne disvastiĝas en Kamboĝo, ne kulpigu la Centran Oficejon, kulpigu la estraron. Se la revuo alvenas kun malfruo, kulpigu la Centran Oficejon kaj ne la estraron. Mi mem multe pli ploras pro tio, ke Esperanto ne disvastiĝas en Kamboĝo ol pro la malfruo de la revuo.

Al tiuj, kiuj diras, ke ni bezonas oficiston, kiu okupiĝu pri Esperanto en tiu aŭ alia kampo, por ke Esperanto disvastiĝu en tiu aŭ alia kampo, mi diras: "oficismo estas la maljunula malsano de esperantismo". Tio, kion ni bezonas estas entuziasmaj kaj libervolaj laborantoj por Esperanto. Sen tio oficisto utilas al nenio.

Sed ĉio estas kunligita. Ankaŭ al movado kiel la Esperanto-movado povas aplikiĝi la diro de Saussure pri lingvoj kiel "sistemo, kie ĉio kunrilatas kaj kongruas".

En ĉi tiu momento mi ne vidas multajn esperantistojn pretajn transpreni volontulajn labor-postenojn ankaŭ ĉar dum jardekoj, se aperis volontuloj kun ideoj fari ion eksterordinaran por disvastigi Esperanton ili estis normale marĝenigitaj kaj pririditaj kiel fantaziuloj. La pasintaj jardekoj estis periodo de "reala politiko", de konkretaj homoj, kiuj volis ricevi konkretajn avantaĝojn de Esperanto. Tiu periodo portis nin al la nuna sak-strato, el kiu ni povas eliri nur per renverso de la sistemo.



Cititaj leteroj – 海外飞鸿

Originale verkitaj versoj de Vladimir Ĥodin el Rusio:

Amikeco – Omaĝe al la 150-jariĝo la naskiĝo de Zamenhof
Malgraŭ land' malproksimecon,
ekzistas en la mondo amikeco,
Unu el ĝiaj reprezentantoj estas la lingvo Esperanto!
Niaj agemaj verdsteluloj estas en ĉiuj teranguloj,
Ili kontaktas tre libere, interrete kaj letere!
Multe ni povas ekscii utilan, kontaktante unu la alian!
Estas diversaj ni ĉiuj, tamen ni memoru pri Dia amo al ĉiu homo,
Kaj ni memoru pri la modesta kuracisto pola, kiu pensante kaj laborante kreis la lingvon Esperanto!
Juneco ne finiĝas ... Al esperantistoj veteranaj
Juneco ne finiĝas, ĝi simple maturiĝas,
Ĉar sperton hom' akiras, tra la vivon kun ĝi iras,
Havante junan koron, animon kiel floron,
Amikojn bonajn, kiuj memoras pri li ĉiam!

Versaĵon de poeto Tatiana Semenova, esperantigita de rusa aŭskultanto Eleonora Tunkova:

“Mi amos, ĉion amas ci...”
Mi amos, ĉion amas ci.
Ĉu Vivaldin? Mi amas Vivaldin.
Ĉu florojn? Mi kreskigos florojn,
Eĉ antaŭ la domo sur asfalto
Spite al la kalendaro
Apud marmoraj reliefoj de Tibero,
Apud argilaj tabuletoj de Tigriso
Elpetegos vian amon.

Leopold Patek pri Fischer kaj Esperanto:

Aŭstria federacia prezidento d-ro Heinz Fischer interesiĝis pri politiko, kiam li aŭdis siajn gepatrojn diskuti pri la Dua Mondmilito kaj la nazia okupo, parolante antaŭ li en Esperanto.

Estante kiel honora Protektanto de la 77-a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno, 1992, li skribis: "Mia patro kaj mia patrino estis entuziasmaj esperantistoj". Antaŭ tiu tempo li estis prezidanto de aŭstra parlamento. li skribis: "Mi ĉiam tre admiris la ideon de

la popolinterliga lingvo Esperanto. Rimarkinda pri Esperanto estas ne nur la genia lingvokreaĵo kaj la lingvistika atingo, sed ankaŭ la humanisma kaj la popolintegriga ideo de la lingvo, ĉar ĝi baziĝas sur la prava supozo, ke homoj emaj paroli unu kun alia ankaŭ kapablas solvi problemojn pli bone. Tial do komuna lingvo, enhavante elementojn de gravaj kulturlingvoj, signifas grandiozan progreson kaj nun, kiel antaŭe estas dezirinda, ke tiu ideo venku kaj ĝi gajnu novajn adeptojn kaj ne nur



memoriĝu kuntekste de la historio de la laborista movado, sed estu konsiderata kiel koncepto por la 21-a jarcento.

D-ro Fischer estis membro de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, kiu havas ligojn kun la Socialdemokrata Partio de Aŭstrio. ASLE estis fondita post la Dua Mondmilito de la forpasinta Franz Jonas, kiu mem poste fariĝis prezidento de Aŭstrio. En 1970 Jonas, kiel Alta Protektanto de la 55a Universala Kongreso en Vieno, flue festoprelegis en Esperanto en la inaŭguro. La patro de Fischer, d-ro Rudolf Fischer, estis prezidanto de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista.

Josef Fischer el Germanio:



Mi mem lernis E-on en la jaro 1979, unua jaro post mia emeritiĝo. Tiam mi havis 65 jarojn. Preskaŭ dekomence mi aŭdis vian elsendon, kvankam la ricevo ne ĉiam estis sufiĉe klara. Mi memoras, ke la alta voĉo de la parolantino por mi estis iom pli klare komprenata. Ne forgesas mi, ke dum ia elsendo el Pekino subite mi aŭdis germanan kanton en la germana lingvo, kantitan de ĉinaj geinfanoj. Jen la teksto en Esperanto: "Klaketas la muelo ĉe la bruanta rivereto klip-klap. Dum tage kaj nokte la muelisto estas maldormanta klip-klap. Li muelas la farunon por la ĉiutaga pano kaj se ni havas ĉi tion, ni ne havas mizeron klip-klap, klip-klap, klip-klap".

Intertempe nun mi havas 95 jarojn. Kvankam miaj oreloj ne sufiĉe bone funkciadas, tamen via "Mikrofone" tre bone ligas min kun vi, malgraŭ ke, miaj okuloj ne plu sufiĉe bone funkcias, sed per grandiga vitro aŭ eĉ per lupeo mi povas legi ĉion.

Gesinjoroj Josef Fischer estas unuj el la plej fidelaj aŭskultantoj, kiuj dum dekoj da jaroj persiste aŭskultas nian elsendon kaj tenas kun ni bonan kontakton. Ili ambaŭ havas nun 95 jarojn. Antaŭ nelonge ili festis la 70-an geedziĝtagon. Ni esprimas varman gratulon kaj deziras al ili sanon, feliĉon kaj longan vivon!

Jiri Patera el Ĉeĥio:

Mi dankas al vi pro via grava peresperanta laboro, ĉar viaj E-lingvaj programoj tre riĉigas mian vivon. Mi dankas por ĉio, precipe por Mikrofone.

Bedaŭrinde la solenajn elsendojn en decembro honore al la 45-jariĝo de via E-elsendo mi ne aŭdis, ĉar ĝuste tiam mia ricevilo ĉesis funkcii. La tuta afero havas tre pozitivan rezulton: Mi al kutimiĝas pli ofte sekvi viajn interretajn paĝojn kaj oportune legi la ĉiutagajn informojn, iam ankaŭ aŭskulti iujn interesajn programerojn. Tial radioricevilo ne estas nun la sola fonto de E-lingvaj informoj pri via lando.

Joop van der Hoeven el Nederlando:

Ĉinio estas lando antikva kun riĉa historio kaj lando de estonteco. Ĉina kulturo kun longa historio fariĝos la plej reala kaj daŭrigema sur nia mizera terglobo en la estonteco. Altaĝuloj en diversaj mondpartoj scias nur pri ĝia antikveco, kompreneble malpli bone ol la ĉinoj. Do, grave estas scii la nunan Ĉinion, ĉar scii

Ĉinion estas scii la estontecon de la mondo.


El la E-novaĵoj de via lando mi konvinkiĝis, ke post la memruiniĝo de la okcidenta mondo, la mondo plue ekzistas en la Oriento. Tiu ĉi konvinko estis fortigita post la gravaj katastrofoj - neĝfrostoj kontraŭbatalitaj energie de ĉinoj.

Iuj okcidentaj amaskomunikiloj multe raportas pri drasta kresko de la milita elspezo de Ĉinio kaj distrumpetas la teorion pri "ĉina danĝero". Ĝuste tio plue fortigis mian konvinkon, ke via lando volas defendi sian estontecon kontraŭ eblaj eksteraj atakoj. Retrorigardante la historion, ĉinoj bone memoras la humiligon de eksteraj fortoj pro sia malforteco!

Prezidanto de Verda Stelanoj-Klubo Honore Sebihoro el Ugando:

Antaŭdankon pro via mesaĝo afabla kaj akompanata de du ekzempleroj de Mikrofone. Mi tre ĝojas ĉar mi iĝis ankaŭ membro de via grupo de aŭskultantoj, malgraŭ ke mi ne aŭskultas ĝin ĉi tie en nia loko Rutshuru distrikto, orienta regiono Kivu, Dmokratia Respubliko Kongo, sed mi pensas, ke ni rete interŝanĝas niajn aktualaĵojn sen problemoj. Mikrofone estas interesa kaj tre utila por mi, per kiu mi scias aktualaĵojn ĉinajn kaj mondajn.

Miaj klubanoj salutas vin. Vivu UEA! Vivu ĈRI! Vivu ĉiuj redaktoroj de ĈRI!





Tra la Mondo – 世界各地

Esperantistoj en la pola parlamentejo

Laŭ informo de informo-esperanto el urbo Bydgoszcz, la 4-an de marto, 2010, la vicprezidanto de Pola Sejmo (la Malsupera Ĉambro de Pola Parlamento) – Jerzy Szmajdziński akceptis en la Parlamentejo geesperantistojn: D-rino habil. Ilona Koutny, Francisko Witucki, Eduardo Kozyra, Kazimiro Krzyżak kaj Mariano Zdankowski.



La geesperantistoj prezentis al la vicprezidanto la deziron, ke Esperanto ricevu statuson de lingvo, samranga kiel la aliaj fremdaj lingvoj en la pola edukad-sistemo. La parlamentanoj kun bonvolemo rilatis al la propono. Ili sugestis, ke la E-grupo proponu al la ministro pri edukado komenci proceduron por la realigo de la prezentita celo. Ili samtempe deklaris apogi la iniciativon. La renkontiĝo pasis en amika etoso kaj finiĝis per komuna foto.

Ni ĝojas, ke inter la akceptitaj geesperantistoj troviĝas niaj aŭskultantoj Kazimiro Krzyżak kaj Mariano Zdankowski. Ni ege bedaŭras, ke la 10-an de aprilo okazis apud la rusa urbo Smolensk aviadila akcidento, en kiu

pereis pola prezidento Lech Kaczyński, lia edzino kaj aliaj elstaraj eminentuloj de Pollando. Unu el la viktimoj estis vicprezidanto de Pola Sejmo Jerzy Szmajdziński. La akcidento skuis la tutan mondon kaj ankaŭ esperantistojn, precipe la polajn. Ni esprimas profundan kondolencon al polaj samideanoj kaj sinceran konsolon al la familianoj de la forpasintoj.

IJK-2011 okazos en Ukrainio

Laŭ komunikado de Lukasz Zebrowski, ke la 67-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Julio, 2011, proksime al Kievo, ĉefurbo de Ukrainio. Tio estis decidita dum lasta reta estrarkunveno.

La kongresejo troviĝas proksime al la Kieva akvo-rezervejo. La organizan teamon kreos Ukraina Esperanto-Asocio kaj Ukraina Ligo de Esperantista Junularo. Tio estos la unua IJK en Ukrainio - sed espereble kun rekorda nombro de partoprenantoj.

E-teatro en la urba teatrejo de Serbio

Laŭ informo de Ret-Info, la 23-an de marto, 2010, en Banja Luka, en la urba teatrejo 'Jazvac' (Melo), okazis unua prezentado de la teatraĵo "Dek Tagoj de kapitano Postnikov", laŭ la romano de rusa verkisto Mihael Bronŝtejn kaj reĝio de Milić Jovanović el Serbio. La teatraĵo estis en Esperanto, kaj la vizitantoj, kiuj ne komprenis Esperanton, povis legi tradukon en serba lingvo sur la blanka tolaĵo.

Ĉirkaŭ 200 spektantoj kelkfoje dum teatraĵo aplaudis kaj tre bone akceptis ĝin. Post teatraĵo en teatra halo okazis solena koktelo kaj spektantoj kun aktoroj babilis kaj faris fotojn.

Kapitano Postnikov, artileria oficiro de rusa reĝa armeo vivis en tempo antaŭ Oktobra Revolucio. Li suferis pro siaj progresivaj ideoj, ĉar li deziris ke ĉiuj popoloj en la mondo interparolu per unu internacia lingvo Esperanto.

La unua prezentado de la teatraĵo okazis dum la 94-a UK en Bjalistoko. Ĉi-jare la teatraĵo estos prezentita en Sankt-Peterburgo dum la Ruslanda Esperant-Kongreso kaj en Velika Gorica dum la kongreso de Kroatia Esperanto-Ligo.

Okazos la 6-a Internaciisma Renkontiĝo en Reus, Hispanio

Kataluna Esperanto-Junularo organizas sian 6-an Internaciisman Renkontiĝon en la 21-a, 22-a kaj 23-a de majo ĉi-jare. La Renkontiĝo temas pri kongreseto disvastiganta la principaron pri lingva daŭripovo kaj Esperanton en la Kataluna Landaro, kaj la katalunan lingvon kaj kulturon al internaciaj partoprenantoj. Tial la gastigantoj ĉiam klopodas organizi ĝin kun lokaj anaroj.

Ĉi-jare la urbo Reus gastigas la Renkontiĝon. La intenco de la Renkontiĝo estas agi kune, katalunaj neesperantistoj kaj tutmondaj esperantistoj. Per iom da helpo, bona volo kaj emo, certe ĉiuj interkompreniĝos, ni interŝanĝos vidpunktojn kaj amuziĝos tre!

Mikronovelo – 微型小说

Am-iluzio



Tiutage ŝi, kun naiveco de infano, rakontis ĉi tion. Fine ŝi demandis, ĉu mi povas verki novelon pri ŝia rakonto, kiun eĉ ŝi mem ne povis kredi:

"En sinsekvaj noktoj soldatino de nia roto sonĝis iun knabon. Kia la sonĝo? Mirinda. Jen ŝi paŝas ĉe maro, ebriiĝante de mara vento. Ŝi portas blankan jupon, sentante sin ŝveba. Ĝuste en tiu momento alproksimiĝas knabo, ne alta nek tre bela, sed ĉiam ridetanta al ŝi, kaj siaflanke ankaŭ ŝi ridetas, kvazaŭ ŝi tre ŝatus lin. Poste ambaŭ preterpasas, unu la alian. En la 2-a tago, ŝi denove sonĝis, ke sur strando de la sama maro ŝi renkontiĝas kun la knabo; ambaŭ jam estas ne fremdaj, tial ili ankoraŭ pli dolĉe ridetas. Tiel do, tiu knabo aperadis ĉiunokte en la sonĝo de mia kunbatalantino. Pli kaj pli intime. Pli kaj pli klara la figuro de la knabo. Kaj pro tio ŝi estis tiel sorĉita, ke ĉiutage ŝi deziregis, ke la nokto frue alvenu. Fine, en iu tago, ŝi ne sonĝis plu la knabon. Ŝi forte elreviĝis. Ni ĉiuj ĉiamaniere persvadis kaj konsilis, ke ŝi ne stultece kreu sonĝon. Sonĝo estas nur sonĝo, ju pli oni deziras ion el sonĝo,

des pli oni estas malespera en la realo. Poste, ŝi iom post iom liberiĝis el la obsedo. Pli poste ŝi rehavis sonĝon, sed ŝi deprimiĝis pro tio, ke ŝi ne povas revidi sian 'reĝidon sur blanka ĉevalo'. Iun tagon ni kune ekskursis. Dume iu konatigis sian iaman kunlernanton al ni. Lin vidinte, ŝi aspektis forte surprizita. Mi demandis, ĉu ŝi malbone fartas. Ŝi respondis, 'Ne! Poste mi diru ĉion al vi.' En la tuta tempo de manĝo, ŝi ĉiam rigardis tiun junulon, tiom fikse, ke li sentis grandan strangecon. Post kiam ni revenis, ŝi konfidencis al mi, ke tiu junulo estas ĝuste la ensongĝa knabo, vere, tute sama. Mi prefere mortaĉu ol kredi tion! Neniu povas kredi tian sensencaĵon. Sed en la sekva tago ŝi konsternite diris al mi, ke ŝi denove sonĝis lin; en la sonĝo li sciigis, ke lastafoje li venis speciale por viziti ŝin. Ŝia mieno estis tiom konvinka, ke ni jam ne povis ne kredi ŝiajn vortojn. Ni donis diversajn ideojn kaj fine decidis revenigi tiun junulon al kuna manĝo. Ŝi komencis proksimiĝi al li, sed li evitis ŝin, ne konatan al li ekster la sonĝoj. Tamen ŝi ne perdis kuraĝon kaj memfidon, firme kredante la

edifon de Dio. Multajn fojojn ŝi iniciative intimiĝis al li kaj eĉ petis lian iaman kunlernantinon konigi ŝiajn sonĝojn al li. Aŭdinte ties rakonton li tre dubis pri ĉio. Poste, pro multaj kontaktoj, li trovis ŝin ne nur bonkora sed ankaŭ sincere bona al li, li do akceptis ŝin, pli aĝan je unu jaro. Ĉu ne strange? Ŝi estas fama belulino kun malvarma ĉarmo. Ŝi estas la sola, kiu plej malmulte parolas kun soldatoj. Ŝi malvarme rifuzis ĉiun, kiu provis ĉasi ŝin. Yang, ĉu vi kredas, ke en la mondo ekzistas mistera forto por iuj kunigi?"

"Kredas. Kial ne? Ankaŭ mi havas rakonton. Jen knabo, kiu plurnokte sonĝis knabinon. Unuanokte, li staras sur alta montopinto kaj rigardas la lastajn radiojn de la subiranta suno. Ŝajnas al li, ke li fakte atendas iun aŭ ion. Ĝuste tiam grimpas knabino, tre ĉarma kaj ridetanta al li. Li do reciprokas ŝian rideton. La samo okazis en aliaj noktoj. Post longa klopodo li trovis ŝian adreson kaj skribis leteron al ŝi. Post longa tempo li ekplaĉis al ŝi, kaj ŝi eĉ kisis lin, tamen ŝi deklaris, ke ŝi pli kredas la realon; kaj ŝi edziniĝis al oficiro..."

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renoviĝas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: esradio@cri.com.cn

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Zhan Xuede

Xiao Henggang